FN PER ANC 47

NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

ESPERANTO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 27 - MARTO 1974 -

Redaktas : Sro Jouis - 62I, rue G. Mugnier - 76 - BOISGUILLAUME

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : IOa de februaro - IOa de Majo - IOa de Augusto - IOa de Novembro -

## GRAND QUEVILLY ATENDAS VIN !

La kongreso de la normandaj esperantistoj, la I6/I7an, de Marto, bone pretiĝas. Ĉiu klopodas por plenigi sian apartan taskon. Por ke tiu ĉi estos granda sukceso, ni petis helpon de laîka amikaro kaj de la komunuma estraro. Ĉio iras glate.

En la kadro de nia kongreso, du [illegible]e belaj eksponicioj pri : La esperantista literaturo en la [illegible]aj : La filatelo kaj Esperanto, estos prezentataj al la publiko. Propagando estos farota en la ĵurnaloj " Signal de Grand Quevilly " kaj " Paris-Normandie ".

Ek de sabato, distra vespero okazos kun la partopreno de folklora trupo de la amikaro, sed la " najlo " estos sen dube : ŝŝt [illegible] tio estas la surprizo. Nur, ni diru ke : " la domo ne retroiris antaŭ nenia oferado ".

La dimanĉo posttagmeze, kiam la laboro estos finita, aŭtobuso veturpromenigos nin ĝis la kastelo de la belega Roberto, tu, ĝuste, kiu enamiĝis al juna bellavi[illegible] apud tiu " mistera lumeto " pri kiu ni parolis en nia dece[illegible]lteno.

Kiel vi vidas, nia grupo ona laboras por sukcesi nian kongreson, tial, ankoraŭ foje ni volas normandajn esperantistojn multnombre partopreni ek de la sabato ĉe tiuj kulturaj manifestacioj.

.../...

Estas necese, almenaŭ foje en jaro sin montriĝi sufiĉe nombraj kaj agemaj antaŭ la publiko, kiu ni devas konvinki kaj la estrocoj el kiuj ni solicitas helpon.

Nune, du dek kvin gesamideanoj nur sendis sian aliĝilon. Ne estas tro malfrue por bone fari. Ĝis la lasta minuto, oni povas ĝin sendi sed la plej rapide estos la plej bone por ĉiuj.

P. Jouvin -

---

FILATELIA RUBRIKETO
-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

ELDONADO DE FRANCAJ POŜT-MARKOJ

10-12-73 : eldono de p-m. je 0,45 F. Dudekkvina datreveno de la Universala Deklaracio pir Homaj Rajtoj.

20-12-73 : Eldono de p-m. je 0,50 F. okaze de la inaŭguro de la Domo de la Filatelio.

21- 1-74 : Eldono de la unua propaganda p-m. por la ekspozicio Arphila 1975 Paris, je 0,50 F.

25-2 -74 : Eldono de p-m. je 0,50 F + 0,10 F Sankta Louis-Marie Grignion de Montfort (serio Famaj personoj)

11- 3-74 : Eldono de p-m. je 0,50 F. + 0,10 F Tago de la Poŝtmarko.

18- 3-74 : Eldono de p-M. je 0,60 F. Aerhaveno Charles-de-Gaulle.

25- 3-74 : Eldono de p.m. je 2,00 F. Verko de Philippe de Champaigne "Kardinalo de Richelieu " .

1- 4-74 : Eldono de p-m. je 0,65 F Centjara datreveno de la alpa Klubo

AFRANKU FILATELE !

M. Bettencourt -

---

ATENTU : Serĉas iun filateliston kiu povas interŝanĝi poŝt-markojn kun li : Sinjoro Oldrick PLACEK
Pat. Lumumby 86 - 70400 OSTRAVA
ĈEKOSLOVAKIO -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

INVITOJ AL VOJAĜOJ :

I°) 59-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
HAMBURGO - 27/7 - 3/8/ 1974
Konstanta adreso : Nieuwe Binnenweg I76
ROTTERDAM 3002 - NEDERLANDO -

- Plej nova eŭropa kongres-centro :
La kongresejo de la 59a UK estos la moderna konstruaĵo de Congress Centrum Hamburg, finkonstruita en 1973, situanta en la koro de la urbo. Ĝi havas I7 salonojn por entute I0.000 personoj; la plej grandan povas frekventi 3.000 personoj. En la kongresejo okazos ĉiuj aranĝoj de la U.K. Apude troviĝas granda restoracio kaj unuaranga hotelo.
Do venu, vidu mem kaj ĝuu la mondurbon Hamburgo; la Loka Kongresa Komitato invitas vin tre kore.

- Aliĝado kontentiga : Ĝis la I0a de Januaro 74 aliĝis al la Hamburga UK jam 911 personoj. Komparo de tiu nombro kun samdataj nombroj en aliaj jaroj, montras ke la 59a UK havas ŝancon esti la plej granda UK de Esperanto okazinta en la lastaj I0 jaraoj en okcidenta Eŭropo.

el " Esperanto "

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

2°) DUM SOMERO DE I974, RESTADO EN G D R -

- La Esperantista Federacio de Laboro organizas dusemajnan restadon, je moderaj prezoj en Germana Demokratia Respubliko.

- Internacia, frata etoso kun esperantistoj kaj ne esperantistoj el diversaj landoj -

- Grupa vojaĝo, ek de Parizo kaj reveno al Parizo, ebleco vojaĝi individue ĝis GDR

- Se tiu vojaĝo-propono interesas vin, se nur vi deziras pli precizajn informojn, skribu al :

S-ro William GILBERT - 50, Croix Montoire
37100 TOURS -

P. J.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Polycopie par le
GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS

Dépôt légal :
Ier trimestre I974
La gérante : N. Peltier -

# VIVO DE LA GRUPOJ

## YVETOT :

- KURSO - Ni havas nur unu kurson ĉi-jare. Ĝi estas duagrada kurso kaj okazas sabate je la I6a horo kaj duono en la Junuldomo, kun 3 lernantoj.
- REĜFESTO - La I3an de Januaro, la Grupo, kiel kutime festis la Reĝojn. Proksimume 50 personoj el Yvetot, Le Havre, Rouen kaj Fécamp ĉeestis la feston en gaja etoso. Tri knaboj el Yvetot montris pop-muzikan spektaklon, kaj fine ĉiuj infanoj ricevis ludilon.

P. Pottier.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Ni notis ke la gazetoj " Courrier cauchois " kaj " Paris-Normandie " longe priskribis kaj laŭdis tiun amikan kunvenon kiu tre sukcesis.

M.T.

-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-'-

## LE HAVRE :

Ni funebras -

Vere, la jaro I973a estis doloriga por la Grupo en Le Havre : en la lasta Bulteno ni legis pri la morto de F-ino Amiard. Ĉi-bultene, ni kun granda malĝojo sciigas pri la forpaso de S-ino Marguerite COLLEU, la 9an de Decembro I973.

Sento je malpleno superŝutis nin en la Grupo. Senbrue, senpretende, S-ino COLLEU ĉiam elfaris efikan laboron. Profesoro en Havra Liceo, ŝi klopodadis enigi la ideon pri Esperanto al siaj lernantoj, semante valoran grenon en konvenan terenon; depost pluraj jaroj, ŝi sukcese atingis la eblecon instrui la lingvon dum la "liberaj horoj" kaj, malgraŭ malsanema stato, ŝi gvidis tiun kurson ĝis la momento kiam ŝi, devigate, ĉesigis ŝian aktivecon...

S-ino COLLEU, ŝultro ĉe ŝultro kun ŝia edzo André, mortinta en I96I, kunagadis en siaj komunaj idealoj : Paco kaj Kontraŭperforteco, anoj de "Societo de Amikoj " ili ne konsideris kiel nuraj vortoj la esprimoj "Helpo al mizeruloj " kaj " Frateco ". Malgraŭ la karaktero je strikta intimeco petata por la funebroj, la Familianoj de S-ino Marguerite COLLEU bonvolu akcepti ĉi tie la enkorajn kondolencojn de la Membroj de la Esperantista Grupo en Le Havre.

J. G.

## IMPRESOJ DE NE-HAVRE-ANINO EN LE HAVRE

Malofte mi havas okazon veturi al Le Havre, kiu estas por mi la fino de ...la tero. Sed, kion oni ne farus por partopreni "saùrkraùt partion", ĉu ne ? Do, la I7-an de februaro, jam iom antaù tagmeze, mi estis en la agrabla salono, kie allogaj tabloj atendis la gastojn. Iom post iom eniris kvindeko da homoj plejparte grupanoj. Venis nur kelkaj el Rouen, Yvetot kaj Eure. La programo konsistis el du partoj; mi povas diri la materia kaj la kultura. La materia, t.e, aperitivo, tagmanĝo kaj manĝeto estis perfekte aranĝita de la sindonaj gvidantoj, kiuj tre larĝe konsideris nian apetiton ! Dume, agrable ludis diversajn muzikilojn junaj grupanoj, kiuj laùvice suriris la scenejon.

Enkondukis la kulturan parton S-ro J. Guillaume el Yvelines, konsiliano kaj iama vicprezidanto de UFE, kiu prezentis al la atenta aùskultantaro tre interesan prelegon pri la malfacila savo de la egiptaj temploj dum la konstruado de la Asuan-baraĵo. Tiam venis diversaj distraj eroj : ĵonglisto, magiistoj, kantisto. Ili ja klopodis kaj sukcesis amuzi la spektantojn; tamen oni povas bedaùri, ke, en "Esperanto"-kunveno" nur unu el ili tre kuraĝe provis paroli la Internacian lingvon, kv[illegible]m videble (kaj aùdeble) li ankoraù ne bone ĝin scipovas. Li meritas gratulon.

La lasta "amuzisto" tute ne amuzis min, sed pri gustoj kaj koloroj.... Grupo tiel grava, kiel tiu en Le Havre, povas kaj devas ja prezenti pli altnivelan kulturan programon. Ne mankas bonaj parolantoj tie. Ĉu la celo de tiaj kunvenoj ne estas la perfektigado de la anoj en la praktiko de Esperanto ?

Jeannine VINCENT -

---

SAURKRAUTO EN LE HAVRE : Noto de la Organizintoj.

Kiel reliefiĝas el la impresoj ĉi-supraj de vizitantino, Esperantistoj bedaùris la malgravecon de la lingva flanko en la aranĝo. Ni devas unue substreki ke ne temis pri "kultura" kunveno sed pri nia jara "Familia Festo" ... kiu kutime okazas sub la preteksto de la "Reĝa Kuko ". Por tiu ev[illegible], la Samideanoj venigas siajn samfamilianojn; tiel rezult[illegible] pli granda nombro da partoprenantoj :la 63 ĉe-estantoj en la kunveno, en tia kunveno, ne estas ĉiuj esperantistoj; tamen amasa nombro da personoj favore impresas la "malfervoruloj ", kiuj emas riproĉi al la edzo aù al la edzino la malgravecon de la movado...krome, la ĵurnalistoj akceptas kun iom pli da bonvolo niajn artikolojn. Bedaù-

.../...

.... rinde, akceptante amason da neuzantoj de la lingvo, oni devigas sin paroli en la "indiĝena idiomo ". Tute malsamas kiam ĉe temas pri "Kultura Kunveno" (ekzemple Zamenhof-Tago); tiam ĉeestas nur Esperanto-parolantoj, sed oni ne invitas gazetistoj por observi dekduon da homoj : estus fuŝpropagando. Tion dirinte, ni tre ĝojas ke nia magiisto klopodas esperantigi sian arton, jam laborplena pro ĝia amatoreco... Pri la kantisto, profesia en sia fako, ni deziregus ke li fariĝu Esperantisto ! ... ĉar tia homo venigus junajn adeptojn al ni !

---

VIVO DE LA NORMANDA FEDERACIO :

La konsilio kunvenis en Evreux la 27-an de januaro por prizorgi kelkajn administrajn kaj financajn aferojn kaj prepari la tagordon de la Kongreson kiu okazos en Grand Quevilly, la 17-an de marto de la 9a ĝis la 11.30. Tiam oni renovigas I/3 de la konsilio. G-roj Colleu, Pottier, Vincent, kiuj finis sian mandaton, estas reelekteblaj, sed S-ro Colleu ne povos rekandidatiĝi, ĉar li forlasos Normandion fine de l'jaro. Novaj kandidatoj bonvolu sin anonci kiel eble plej frue : la laboro de konsiliano ne estas tre granda nek malfacila kaj la kunvenoj okazas nur 4 fojo jare, inter ili unu dum la kongreso.

---

Informoj : UFE havas nun novan telefonnumeron : 278 68 86. Oni povas telefoni ĉiutage de la 9-a ĝis la I2-a kaj de la I4-a ĝis la 17-a escepte dimanĉe kaj lunde. Vizitu la novan sidejon : 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris (Metrostacio : Bastille aŭ Sully-Morland. Ĝi ja estas agrabla.

Daŭre vi povas sendi donacetojn, eĉ donacegojn al la Fonduso-Domo por finpretigi tiun sidejon. Uzu la federacian poŝtĉekkonton kiu transdonos (CCP Rouen 2348 06 Z)

---

U. N. E. -

Via kasisto : S-ro E. Jouis, 62I, rue Georges Mugnier 76230 Boisguillaume, petas tiujn kiujn ne ankoraŭ pagis la kotizon al UNE, tion fari kiel eble plej frue.

La kotizo estas nur : 2 frankoj jare - sed oni povas sendi pli ... Tio permesas al vi ricevi 4 "Normanda Bultenon"jn dum la jaro -

La kontoadreso estas :

Union des Espérantistes de Normandie

CCP ROUEN 283 - 40 E

Antaŭdankon !

---